Universala Esperanto-Asocio

ZAMENHOFAJ FESTOJ

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2014-50 sendita en la 15a de decembro

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

# Saluto kaj raporto okaze de la Zamenhofa Tago



Kiel respondeculo en UEA pri rilatoj kun Landaj Asocioj, mi kore salutas vin okaze de la Zamenhofa tago, kiujn oni festas en nunaj tagoj tra multaj dekoj da landoj en ĉiu kontinento. Okazis en Hungario jam du festaĵoj, en la 6a de decembro en Nyíregyháza (sur la apuda foto) kaj hieraŭ, la 14-an de decembro en Budapeŝto. Tie, kvardekkvino da partoprenintoj plenigis la festan salonon de la konstruaĵo kiel troviĝas la sidejo de HEA. Ambaŭ aranĝoj inkluzivis festan saluton flanke de UEA. Jen precize 100-vorta resumo de la du (neidentaj) salut-prezentaĵoj:



"Zamenhof donis al ni multe pli ol nur lingvon. Per la *Unua Libro* li pioniris en informado. Lia abunda korespondado atestas klaran komprenon, ke por vivigi lingvon necesas parol-komunumo. Frue li apogis la starigon de kluboj, revuoj kaj renkontiĝoj. Feliĉe; baldaŭ limiĝis la ebloj starigi tiujn en la propra loĝlando. Tiuj alilindaj komunum-ĝermoj savis la lingvon. Nia misio en UEA, kunlabore kun aliaj, estas agnoski, ke vigla kaj reprodukto-kapabla komunumo esencas por la prospero de la lingvo. La nova programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO) celas zorgi pri la konscia kreado kaj trejnado de novaj generacioj por nia lingvo-komunumo."

En Nyíregyháza la 10-minuta alparolo inkluzivis skizan resumon pri la ĉefaj celoj kaj atingoj de la AMO-programo (pli kio legu sur p. 8 de la januara revuo *Esperanto*). En Budapeŝto la AMO-prezentaĵo ricevis apartan lokon en la programo, kio permesis ilustritan prezenton de la ok seminarioj de 2014 plus la kvin ĝis nun aprobitaj por 2015. La prezentaĵoj inkluzivis disdonon de la nova varbfolio de UEA 'Kaptu novan venton', (vidu la novembran revuon *Esperanto*, p. 221) de kiu stoko estas ricevebla de la CO kontraŭ peto de perantoj, ĉefdelegitoj, asocioj kaj unuopuloj.

Ne mankis instigo pri abunda partopreno en la jubilea centa UK en Lillo, por kiu estis akceptitaj kadre de la aranĝoj pluraj aliĝoj. Pliaj Zamenhof-festaj renkontiĝoj okazos en Hungario tra sekvaj tagoj: merkrede la 17an de decembro en Debrecen, tagon poste en Szeged kaj du tagojn poste en Vác.

Vortoj: 335